*Marto 1952 N-ro 7*

# LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO"

*Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Graftdijk (NH), Nederlando*
*Ĝironumero 382363* *Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro*

## VICTOR HUGO (1802-1885).

„Tiu jarcento aĝis du jarojn ......"

La XIX-a jarcento efektive estis dujara, kiel diras la menciita kaj famigita verso, kiam naskiĝis, la 26-an de februaro 1802-a (ĝuste antaŭ 150 jaroj) tiu, kiun oni ankoraŭ nun konsideras kiel la plej bonan kaj faman francan poeton. Victor Hugo, filo de generalo Hugo, manifestiĝis jam 15-jara kiel poeto komplimentata de la Franca Akademio kaj ambiciema: „Mi volas esti Chateaubriand aŭ nenio", li skribis sur kajero.

Victor Hugo, kiu longe vivis (li mortis en 1885-a), sukcesis en ĉiaj specoj: poezio, teatro, romano. Li iĝis la estro de la tiama romantika movado kaj la triumfo de la romantika movado kaj la triumfo de la romantika skolo manifestiĝis per la sukceso de lia dramo „Hernani", kies prezentado ĉe la „Theâtre Français" en 1830-a okazigis faman kvereladon.

Liaj romanoj estas fame konataj kaj legataj ne nur de la intelektularo, sed de la tuta franca popolo kaj certe ankaŭ eksterlande.

„Notre-Dame de Paris", kies ĉefa rolanto estas la pariza katedralo, revivigas la mezepokan Parizon. „Les Misérables" (La Mizeruloj), vasta kaj ampleksa verko, vera ĉefverko de la popola literaturo, estas protesto de la poeto kontraŭ la tiama socia ordo; ĝia traduko aperis antaŭ nelonge en Ĉinlando: jam estas vendataj kvin milionoj da ekzempleroj!

Victor Hugo konsideris, ke la poeto devas esti la „resonanta eĥo" de sia jarcento, kaj tion li mem estis per siaj popolaj romanoj, sia rolo kiel gvidanto de la romantika generacio, siaj filozofiaj poemoj, en kiuj li esprimis siajn konceptojn pri la universo kaj ĝia destino, kaj ankaŭ per sia politika sinteno: li kontraŭbatalis Napoleonon III-an kaj vivis longtempe ekzilita en Belgujo kaj en la anglaj insuloj Jersey kaj Guernesey. La satira poemaro „Châtiments" (Punoj) estas batalilo kontraŭ la dua Imperio.

Lia plej grava poezia verko „La Légende des Siècles" (Legendo de la jarcentoj) estas granda bildaro de la monda historio. Post la unua parto „De Eva al Jesuo" kun la judaj profetoj sekvas la Roma epoko, Islamo, la kavaliraj legendoj el devenoj skandinava, germana, franca, ekvidiĝas Oriento, Italujo mezepoka, la Renesanco, la XVII-a jarcento kaj fine lia propra epoko (XIX-a jarcento), el kiu kelkaj poemoj („Post la batalo", „La Malfeliĉuloj") estas konataj de ĉiuj; la lastaj ĉapitroj eĉ antaŭvidas la XX-an jarcenton kaj „ekster la tempoj", la Trumpeton de la Lasta Juĝo.

Mi aldonu, ĉar tio ne estas malgrava afero, ke Victor Hugo ĉiam manifestas per siaj poemoj kaj politikaj paroladoj sian sopiron al Paco. Li **la unuan fojon** parolis pri Unuiĝontaj Ŝtatoj de Eŭropo, ĉe la Leĝodona Deputitaro, la 17-an de julio 1851-a, kaj tio estis bona okazo por liaj kontraŭuloj prezenti lin kiel frenezulon.

Per tiuj kelkaj linioj mi intencis ne alporti valorajn komentariojn pri Victor Hugo — pri kiu oni skribis kaj skribos multege da libroj — sed konigi tiun homon kaj poeton ja konindan al tiuj, kiuj havis pri li neniun konon aŭ malprecizajn ideojn. Tion mi konsideris kiel la plej bonan manieron por honori la memoron de nia plej fama nacia poeto, kies famo atingis la tutan francan nacion kaj transpasis multajn landlimojn kaj kies cent kvindekan naskiĝ-datrevenon oni nun festas.

Michel Duc Goninaz, Parizo.

## ORIGINALA PROPAGANDISTINO.

Aŭdinte, ke **Sinjo** vizitos nian klubon, mia tuja ideo estis, ke mi nepre petu de ŝi intervjuon por la legantoj de „La Juna Vivo".

Kial? Nu, ĉar Sinjo estas unika samideanino en la Esperanto-movado. Sed ni prefere demandu al ŝi mem. Jen, kion ŝi rakontas.

...... Antaŭ tri jaroj, kiam mi havis 11 jarojn, mi eklernis nian lingvon kune kun la patro. La unua granda Esperanto-evento, kiun mi partoprenis, estis la 6-a T.J.O.-Kunveno en Konstanz. La restado en tia Esperanto-medio tiel ege plaĉis al mi, ke mi post tio deziris vojaĝi ankoraŭ multe pli.

Sekvis kongresoj en Svislando. Kaj nun, fininte mian lernejan tempon, mi faras rondvojaĝon tra pluraj landoj, invitita de miaj geamikoj. Unue Danlando, tiam mi vojaĝis kun Sveda karavano al la U.K. en München kaj en la fino de la pasinta jaro mi unuafoje transpasis la limojn de Francujo. Mi klopodas viziti kiom eble plej multe da kluboj kaj lernejoj. En Parizo mi restadis dum monato kaj tie havis eĉ la okazon fari etan prelegon en Sorbonne. Antaŭ kelkaj tagoj mi venis de Anglujo, kie mi vizitis multajn lernejojn kaj propagandis por nia lingvo. En Birmingham anoncis sin post varbkunveno pli ol 500 knabinoj por kurso!

La unua konatiĝo kun via lando ne estis tiel agrabla ......

...... Ĉu ne agrabla???

...... Jes, pro ia miskompreno oni ne atendis min ĉe la elŝipiĝo en Hoek

van Holland kaj ...... la riverpolico kunvenigis min al Rotterdam! Feliĉe post nelonge liberigis min samideanoj kaj nun mi tre ŝatas esti tie ĉi. Post vizito al Amsterdam kaj Edam mi reiros al mia lando. Unue mi pasigos kelkajn tagojn en Rejnlando kaj tiam ...... hejmen!

...... Tiam vi do fine havos la okazon ripozi post via vagabondado!

...... Ho ne! Jam mi havas inviton paroli antaŭ la radiostacio de Stuttgart kaj poste mi verkos libron pri miaj travivaĵoj en la germana lingvo. Sed ĝi certe aperos ankaŭ en Esperanto-traduko. Kaj mi ne forgesu, ke oni eĉ en Japanujo invitis min. Mi tre esperas, ke ankaŭ tiu vojaĝo iam efektiviĝos ......

...... Sed jen ni estas interrompataj de aliaj esperantistoj, kiuj demandas mil kaj unu aferojn. Mi adiaŭas.

Nur malofte ni povas konatiĝi kun tiel juna esperantistino, kiu tute perfekte scipovas nian lingvon. Jam nun, nur 14-jara, Sinjo faras al nia movado grandegajn servojn, samtempe restante ĉarma kaj modesta knabino. Ni esperas ankoraŭ ofte renkonti ŝin, ĉu en Ry, ĉu ie alie en Esperantujo.

Ĝis la revido, Sinjo! H. V.

## NIA 8-a I.J.K. EN RY (DANUJO).



Vido al Himmelbjerget

La preparoj por nia 8-a I.J.K. jam bone progresas. En la venonta numero ni aperigos la unuan liston de partoprenontoj. Tiuj, kiuj do intencas partopreni kaj ne jam anoncis sin, faru tion baldaŭ!

Nepre kunportu fotoaparatojn, ĉar ni intencas aranĝi fotokonkurson (pri fotoj, faritaj en RY).

Plue ni pripensas aranĝi konkurson pri verkaĵetoj faritaj pri la I.J.K., pri Ry, pri Danujo, dana kulturo, k.t.p. Kompetenta komisiono prijuĝos la fotojn kaj verkaĵojn kaj la gajnintoj ricevos (laŭaĝe) belajn premiojn. Nur anoj ĝis 30-jaroj rajtos partopreni.

**Ĉiujn librojn, vortarojn kaj esperantaĵojn liveras la T.J.O.-Libro-Servo, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned. Ĝironumero 570720.**

# MILITRIFUZADO.

*(Ni enpresigas ankoraŭ 2 verkaĵojn pri tiu temo kaj proponas tiam fermi la diskutadon pri ĝi en L.J.V., kvankam la problemo certe ankoraŭ havas aliajn flankojn. Ĉu ne la spirita rezistado povus montriĝi pli forta ol defendado per armiloj? Sed nia spaco estas limigita. Espereble tiuj, kiuj iros al Ry, tie parole daŭrigos la diskutadon. — Red.).*

**I.** Neniel, laŭ mi, oni rajtas disigi la problemon de la milirifuzantoj de la problemo de la paco mem. La problemon oni malbone prezentis. „Laŭleĝa murdo tamen estas murdo", diras la militrifuzanto (L.J.V. N-ro 3) kaj tion mi, kiel kristano, povas nur aprobi, sed la sama ordono, kiu malpermesas al mi mortigi mian proksimulon, malpermesas ankaŭ sin-mortigon. Kaj laŭ mi (kaj kiu povus tion kontraŭi?) ne-defendo egalas sin-mortigon.

La militrifuzanto de s-ro Jean Rey estas ne nur akra egoisto, kiel rimarkigas la „kontraŭulo", sed ankaŭ eraranto laŭ filozofia vidpunkto: „Kruelega estas via socio, kiu devigas la homojn agi tiel. Vi organizu ĝin pli bone." — Sed kio estas la „socio", se ne ni kune, ankaŭ tiuj, kiuj opinias ĝin, tre prave cetere, kruelega? Ĉiu homo respondecas pri la socio; kiu ne volas konservi tiun respondecon, ermitiĝu.

La militrifuzanto de s-ro J. Rey argumentas per la temo de la individua libereco; li riproĉas, ke oni malrespektas tiun liberecon. Sed lia sinteno havas kiel logikan konkludon, ke aliaj devos eventuale preni armilojn kaj batali por protekti lian propran liberecon, se tiu estos minacata de atakonto. Se ni estas veraj militkontraŭuloj kaj sinceraj pacamantoj, tion ni devas montri kaj agi laŭcele. Murdi estas krimo. Jes. Sed sin reteni, kiam aliaj estas murdataj, estas eĉ pli granda krimo. Oni ne devas lavi siajn manojn, kiam baldaŭ eble sango ekfluos. Tio estas la sinteno de Poncio Pilato.

Mi opinias, ke Texier (L.J.V. n-ro 4) tuŝis la ĝustan punkton de la problemo, kiam li konsideras la problemon de la patrolando. La forigo de ĉiaj ŝovinismoj estas la unua kaj nepra kondiĉo por efektivigo de daŭra paco. La naciistan ekstremismon (kiu kondukas al atakema imperiismo) oni devas forĵeti el la spiritoj, la landlimojn oni devas frakasi kaj disbati. Tio devas esti la unua zorgo de la Esperantistaro: „Ni inter popoloj la murojn detruos ......"

Mi ne volas nei la verajn kaŭzojn de la militoj; ili estas iuj ideologioj kaj ĉefe iuj ekonomiaj situacioj, sed mi diras, ke nur la ekzisto de „patrolandoj" kaj naciista spirito ebligas la militojn.

Ĉiu amas sian patrolandon, kara amiko Texier, kaj tio estas tute natura, kvankam vi ne elektis ĝin (ĉu vi elektis viajn gepatrojn?). Sed la „patrolando", ĉu ĝi ne estas unue la vilaĝo aŭ la urbo, kie oni naskiĝis? Kaj tiam, ĉu interne de sama nacio ofte batalas vilaĝoj aŭ urboj aŭ provincoj unu kontraŭ la alia? Ne ...... sed tio iam en la Historio okazis, kiam tiuj urboj aŭ provincoj estis disigitaj de limoj kaj funkciis kiel apartaj ŝtatoj.

Mia konkludo estas jena: ĉiu el ni respondecas pri la paco ...... aŭ milito. Nur ege malgranda malplimulto da fanatikuloj aŭ kanonfabrikantoj deziras militon. NI ZORGU, KE TIU MALPLIMULTO NE REGU NIN. Devo estas por ĉiu el ni proksimigi la popolojn kaj forigi la barojn, kiuj staras inter ili.

Tio estas unue afero individua sed havos efikon nur, se ĝi iĝas kolektivo. Ĝis tiu kolektivo estos iĝinta la tuta homaro, mi konsideros kiel mian devon defendi mian patrolandon, tio estas defendi min mem kaj ankaŭ miajn parencojn, mian liberecon kaj mian propraĵon. „Mia patrolando estas la tuta mondo". Plej prave. Sed tiu bela diro, plej ĝusta kaj justa laŭprincipe, havos taŭgecon nur kiam ĉiu opinios same. — Tio tute ne estas solvo de timemo. Estu certa, kara „militrifuzanto", ke kristano, kiu estas devigata mortigi homfraton por defendi sian vivon, suferas pli ol la militrifuzanto, kiu estas enkarcerigita aŭ eĉ mortpafata pro sia rifuzo militservi.

Ni neniam tro insistas pri la neceso de federacio de la popoloj. Kiam baroj ne plu ekzistos inter la nacioj, la konfliktoj estos reguligataj (kiel en ordinara lando) per polico. Militarmeo povas fari nur malbonan policon. Tiuj el ni, kiuj bonŝancas vivi en demokrataj landoj, kie oni rajtas libere esprimi sian penson, devas komprenigi tion per ĉiuj rimedoj al siaj regantoj.

Michel Duc Goninaz, Parizo, Franc.

**
*

**II.** Pri Gandhi mi certe samopinias kiel L. Gordon Watson. Jam plurfoje mi havis la okazon pritrakti ties ekzemplojn antaŭ miaj skoltoj (mi estas trupestro). Sed, kamarado, mi estas tre scivola scii, kiom da militrifuzadeptoj mem militrifuzis. Ankaŭ tio estas iom pensiga.

Certe vi pravas, skribante, ke „la milito estas krimo kontraŭ Dio kaj la homaro" ...... Sed ĉu militrifuzi estas la vera solvo por kontraŭi la krimojn al Dio kaj la homaro? Kio efektive estas militrifuzo? La afero multe interesas nin, sed ofte ni miskomprenas ĝin ......

Kiel efikus internacia senarmileco kaj laŭŝajna repaciĝo se, samtempe, en ĉiuj landoj la maljunuloj malsatus kaj mortus pro malvarmo en ventoplenaj ĉambraĉoj, se oni ĉie rajtus „bredi" ftizulojn kaj tuberkulozulojn per protekto de alkoholejoj kaj neoficiala konsento por multaj aliaj malsanigejoj, se la mono de la popolanoj perdiĝus en la poŝojn de pli bonŝancaj, se la patrinoj estus devigataj forlasi la idaron por manlabori pro nesufiĉa edza salajro?

Ĉu iom valorus oficiala repaciĝo inter Usono kaj Sovetio, se daŭrus tia vivsituacio en ĉiuj landoj?

Ne, amiko, la unua paco gajnota (kiun oni ne akiros en militrifuzantmalliberejoj (???-demandsignoj de la red.)) estas la paco en la koro (Dio tion preferas) kaj la paco en la ordinara vivo: socia vivo per oportuna disdono de la riĉaĵoj, religia paco per tutlibera edukpovo, pensa paco por akcepto de ĉies opinioj sur libera tutmonda tribuno.

Oni jam organizis sufiĉe multajn internaciajn movadojn. Kio pliboniĝis? Mahatma Gandhi ne celis famon 1) en la malliberejo; pli multe li serĉis por siaj samlandanoj socian kaj religian pacon ol la senarmigon.

J. L. Texier, Paris, Francujo.

---

1) Certe s-ro Watson ne asertis, ke Gandhi celis akiri famon! La Mahatmo klopodis montri la forton de senarmila batalado.

**La venonta n-ro aperos en la komenco de majo.**

## ARTIKOLOJ KAJ NEŬTRALECO.

*(Entute ni ricevis nur 3 reagojn je la artikolo de T.K. en L.J.V. n-ro 5. Bedaŭrinde, ke ne pli multaj skribis. Kompreneble la redakcio bone konscias pri la konsekvencoj, kiujn aludas Felixs Kat en sia verkaĵo. Efektive estus eksperimento. Ni tial jam pripensis la starigon de „libera tribuno", kiun proponas Ph. Cullus en sia postskribo. Sed, ĉar la problemo estas grava kaj nur tiom malmultaj esprimis sian opinion, ni nun proponas parole pritrakti la aferon en la I.J.K. en Ry kaj eventuale tie voĉdoni pri ĝi. — Red.).*

Konsiderante, ke la organo „La Juna Vivo" estas unu el la malmultaj interligiloj inter la anoj de T.J.O. kaj ofte por multaj junaj Esperantistoj la sola Esperanto-legaĵo kaj ke la artikolo de T.K. en la januara n-ro de L.J.V. naskiĝis unualoke pro manko de taŭga diskutmaterialo kaj eble eĉ de enhavomaterialo, tiu artikolo certe meritas ĉies atenton.

Sendube la supertendenceco de T.J.O. ĉirkaŭbaras vastan diskutoterenon. Tamen ni bone pripensu la danĝerojn, kiujn tendencaj artikoloj povas kunporti. La hodiaŭaj gravaj konfliktoj en la mondo povas kaŭzi, ke organo kun tendenca(j) artikolo(j) estos malpermesata en kelkaj landoj. Ekzistas la danĝero, ke anoj alimaniere perdiĝas, nome pro eksaniĝo propavola. Ni ja ĉiutage spertas, kiom granda estas la manko de toleremo, speciale se temas pri politikaj kaj religiaj konceptoj kaj ideoj.

„Do jen tasko por T.J.O.: akceli la toleremon," oni eble diros.

Efektive tiu tasko estas bela, tamen mi opinias, ke, en sia nuna stato, T.J.O. **ne** risku nomitajn danĝerojn per tia eksperimento!

Cetere estas tute ne certe, ke la diskutemo estos akcelata per tendencaj diskutoj; kial ja la problemo „Junuloj antaŭ la Vivo", kiu estis interesa por multaj anoj, ne liveris pli da verkaĵoj? (Temas ja unue pri interesaj artikoloj).

Mi konscias, ke per ĉi ĉio mi ne alportas la solvon. Pli ol instigi la anojn, la redakcio de L.J.V. ne kapablas fari ĉi-rilate.

Ŝajnas al mi certe konsilinde, ke L.J.V. enhavu pli da novaĵoj pri la Esperanto-movado kaj sciigojn de la perantoj k.a. pri atingitaj sukcesoj aŭ malsukcesoj, por kiuj lastaj ni komune serĉu solvon. Resume: oni konigu siajn spertojn pri propagando, kunvenoj, varbado k.t.p. (ke regula kontakto persona per kunvenoj koncerne ĉi tion estas multe pli efika, estas memkompreneble, tamen tiu afero ĉi tie ne estas ĝustaloka).

Nia T.J.O. **unue** fariĝu forta!!!

Felix Kat, Nederlando.

**
*

**Artikoloj kaj Neŭtraleco.** — Sub tiu titolo T.K. prezentis en la januara n-ro de L.J.V. problemon, pri kiu ĉiuj T.J.O.-anoj ĝenerale kaj la legantoj de nia belga bulteno speciale delonge konscias, problemon, kiu ĝis nun ne estis oficiale solvita.

Ĉu, pro neŭtraleco, „forpreni de ni gravan parton de la diskutotereno, parton, kiu eble pli bone kondukas al reciproka estimado kaj komprenado

de niaj ideoj kaj konceptoj ol la pritrakto de aferoj, kiuj, kvankam tute neŭtralaj, kelkfoje ne meritas sinceran pripensadon?"

Mia ĉiama respondo: NE!

Kial „NE!"?

Tutmonda Junular-Organizo celas disvastigon de Esperanto. Esperanto estas kreita de homo, kiu esperis malaperigi konfliktojn per disrompo de la lingvaj baroj. Ĉu lingvaj konfliktoj estas multaj? Jes, sed ili havas pli profundajn originojn ol la nura lingva diverseco. Gravaj konfliktoj okazas, kiam iu registaro volas malpermesi uzadon de gepatra lingvo en lernejoj de novakiritaj teritorioj. Vera kaŭzo: politiko. Lokaj disputoj okazas, kiam malsamlingvanoj renkontiĝas. Ĉu ofte? Kaj kie? Plejofte kiam unu el la disputantoj apartenas al lingva grupo, kiu estis subpremita de la alia lingva grupo. Vera kaŭzo: rememoro de politika konflikto.

Estas do des pli malĝuste diri, ke militoj havas kiel kaŭzon la diversecon de la lingvoj (Usono kaj Anglujo, Germanujo kaj Aŭstrujo jam interbataladis .........). Oni facile ekvidas, ke la kaŭzoj de militoj kuŝas en la evoluo de ekonomiaj sistemoj, kiujn plej ofte akompanas la naciecaj, religiaj, rasaj kaj politikaj konceptoj.

Kaj diri, ke Esperanto malaperigos tiujn konfliktojn, estas eraro kaj danĝera trompo.

Esperanto povas nur helpi al tiu malaperigo, donante al ĉiu la eblecon ekkoni la aliajn naciajn, religiajn, rasajn, politikajn konceptojn, esplori la asertojn pri aliaj landoj, reĝimoj, filozofioj k.t.p. Tiel Esperanto permesos al ĉiu lerni pli rapide, kie kuŝas la veraj kaŭzoj de niaj konfliktoj; tiel Esperanto unuigos ĉiujn homojn kontraŭ tiuj veraj kaŭzoj.

Tial ni estu logikaj.

Se ni, Tutmonda Junular-Organizo, celas disvastigon de Esperanto kaj samokaze pacon per malaperigo de niaj konfliktoj, ni devas doni al ĉiu el niaj anoj eblecon lerni, kie kuŝas la kaŭzoj de tiuj konfliktoj, ni devas permesi al ĉiu el niaj anoj esprimi tute libere siajn opiniojn en la gazeto, kiun ĉiu el niaj anoj legas, en „La Juna Vivo".

Philippe Cullus, Belgujo.

**P.S.** Por ke malamikoj de T.J.O. aŭ de Esperanto ne diru „T.J.O. estas tiatendenca", ĉar ili legis iun tendencan artikolon en L.J.V., oni akceptu tiujn artikolojn nur en iu „Libera Tribuno" aŭ „Diskuto-angulo", sub kies titolon oni represu la statut-artikolojn, kiuj temas pri: 1-e la celoj de T.J.O., 2-e pri T.J.O.-neŭtraleco, kaj oni aldonu, ke respondecas pri tiuj artikoloj, nur la subskribintoj, sed ne L.J.V. aŭ T.J.O.

---

**Junuloj, kiuj deziras viziti Parizon,** estos akceptataj de la Pariza Sekcio de Tutmonda Junular-Organizo kaj povos restadi por tre malalta prezo (50 fr. tage) en la junulargastejo de Maisons-Alfort, je 4 km sudoriente de Parizo (5 minutojn per aŭtobuso). En tiu hejmo estas litoj, kuiraparato, manĝilaro, fluanta akvo, k.t.p. La anoj de la Pariza T.J.O.-sekcio prizorgos vian vizitadon en Parizo kaj eventuale aranĝos la malfacilaĵojn de pasporto, monŝanĝo k.t.p. Skribu al: Jacques Bertin, 96 rue Jean Jaurès, Maisons-Alfort, Seine, Francujo.

**Aliaj organoj bonvolu represi!**

## ORGANIZAJ INFORMOJ.

*(Sekretariino: Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.).*

Aperis la belga bulteno, n-ro 3, februaro.

La nederlandaj T.J.O.-grupoj en Haarlem kaj Hengelo denove organizas sian tradician tendaron, verŝajne en Gelderland. Oni aliĝu ĉe: s-ro J. v. Houten, Pegasusstr. 87, Haarlem-N.

Se anoncos sin sufiĉe da interesatoj, ni organizos en Nederlando, antaŭ la I.J.K. unusemajnan kunvenon sub la gvidado de sperta esperantisto kun la speciala celo doni la okazon ekzerci paroladon en Esperanto. Aĝlimo 25 jaroj. Oni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ ĉe la sekretariejo, samtempe menciante, ĉu oni havas specialajn dezirojn rilate al loko kaj dato. Eksterlandanoj estos kore bonvenaj!

**Funebro.** — Ni elkore kondolencas nian fidelan aninon s-inon A. Tiessen-Spaans (Warmoesstr. 59, den Burg, Texel, Nederlando), kies edzo, Tijs Tiessen, mortis la 8-an de marto. S-ro Tiessen estis konata esperantisto sur la insulo Texel.

## KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Ĉeĥoslovakujo:** Kiu samidean(in)o dez. akiri valorajn Esp. librojn kontraŭ jarabono je naciaj E-gazetoj? Skribu al Milada Hronová, Jihlava, Rooseweltová 8.

Esperanto-junularo, Šumavská 250, Č. Budejovice, dezr. kor. Al ĉiu korespondaĵo ni respondos.

S-ano Miroslav Drápal, PSZPLDP-KZXI, Olomouc 2, Blánicka 1, dez. kor. kaj interŝ. il. poŝtk., insignojn. Resp. certa.

**Japanujo:** 2000 geklubanoj dez. kor. kaj interŝ. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Ni nepre respondos. Esp. Koresponda Klubo, 260 Oka-Shinmachi, Hirakata-City, Osaka.

**Kanado:** La eks-Bremenanoj, Otto Bohl kaj Hans Jürgen Logemann elmigris al Kanado kaj sciigas al siaj korespondantoj ke la nuna adreso estas: Amesdale, Ontario, Mile 55.

**Nederlando:** Sendu bildkarton pri ventmuelilo kaj vi ricevos tian karton pri nia belega ventmuelilregiono. E. v. Walsum, Fop Smitstr. 68, Alblasserdam (Z.H.).

**Korekto:** En la anonco de la lernantoj de la teknika lernejo en Rotterdam, en la antaŭa n-ro, mankis la 6-a nomo: D. M. Kayadoe, Regentesselaan 16, Oegstgeest. — La adreso de W. Dröge en Schiedam ŝanĝiĝis, ĝi nun estas: Nieuwe Haven 123h. — J. Groenveld ne loĝas en Oegstgeest, sed en Barendrecht.

**Svedujo:** Nia grupo da komencantoj (10-50-j.) dez. kor. kun la tuta mondo. Skribu al instruistino Edla Isaksson, Box 343, Koskullskulle.

**La Nordfranca ĵurnalo „Nord Éclair"** (Lille) aperigas ĉiuĵaŭde, en la kadro de sia **junula** rubriko, Esp. kurson, redaktita de Lucien Giloteaux, T.J.O.-ano kaj helpsekretario de la loka grupo.